

# La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2018. №4



## Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2018. №4 (282)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas nur elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

**Aperas** ĉiumonate, krom aŭgusto. Senpaga literatura suplemento jarfine.

**Fondita** en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

**Eldonas kaj administras:** Halina Gorecka

**Redaktas:** Aleksander Korĵenkov

**Konstantaj kunlaborantoj:** Peter Baláž, István Ertl, Paweł Fischer-Kotowski, Irina Gonĉarova, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajevo, Sergio Pokrovskij

**Poŝta adreso:** RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

**Retpoŝtaj adresoj:** sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

**Retejoj:** <http://esperanto-ondo.ru>, <http://sezonoj.ru>

**Perantoj.** Vidu la liston sur p. 65-66.

### Abontarifo por 2018

Internacia eŭra tarifo: 15 eŭroj

Internacia dolara tarifo: 17 usonaj dolaroj

Pollando: 60 zlotoj

Ruslando kaj Belarusio: 750 ruslandaj rubloj

### Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripeto.

**Donacoj:** La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto «avko-u» ĉe UEA.

**Recenzoj:** Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

**Represoj:** Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2018, №4 (282).

Ежемесячный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 2 апреля 2018 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i> .....	2
En ĉi tiu numero .....	3

<b>Temo</b> .....	<b>5</b>
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. La unua senpapera jaro de <i>La Ondo</i> ...	6

<b>Eventoj</b> .....	<b>8</b>
Povilas Jegorovas. Zamenhof-ekspozicio en Panevėžys .....	9
Povilas Jegorovas. NDK: Prezento en Vilno .....	10
Alisa Zingerman, Irina Gončarova. Praktiki Esperanton sen forlasi la hejmon! ..	11
Maria Aparecida da Silva. Legio de Bona Volo okazigis atelieron pri Esperanto.	13
Rudolf Fischer. Bibliaj Tagoj 2018 en Majenco .....	14
Jorgos. Pireneoj: la 25a korusa staĝo .....	15
Martine Demouy. Ĉe Mediteraneo: Esperanto, maro kaj ... neĝo .....	17
Marion Quenut. Dektaga semajno en Tuluzo .....	18
Tuomo Grundström. Okazis VT en Bonvilaĝo – okazos UK en Lahtio .....	19
Ronald Schindler. La deka Ponta Festo .....	20
BET-55 okazos en Panevėžys .....	21
TEJO denove ĉeestos en Strasburgo .....	21
ESF aktivas en la jaro de sia ora jubileo .....	22
ESF subvencii Esperanto-bibliotekojn .....	22
ESF subtenas konservadon de Esperanto-pasinteco .....	22
Aperis enciklopedio de eminentaj esperantistoj .....	23
ESF antaŭenigas lingvolernadon en Usono .....	23
ESF nomas novan kunordiganton de universitataj aferoj .....	24
Koncize (11 informoj) .....	25

<b>Tribuno</b> .....	<b>26</b>
Peter Baláž, Jozef Reinart. Plurlingvula kunveno denove okazos en Bratislavo	27
Jean-Luc Tortel. La filozofo Alain, komisaro Maigret kaj kelkaj samideanoj ...	29

<b>Urboj de Ruslando</b> .....	<b>31</b>
Vadim Biserov. Urbo, kie komenciĝas Eŭropo .....	32
Nikolaj Lozgaĉev. "La temploj, de la tempo mezuriloj..." .....	35

<b>Arkivo</b> .....	<b>36</b>
Vytautas Šilas. Forpasis Virgilijus Noreika, homo kiu sonigis Esperanton .....	37
Aleksander Korĵenkov. Jubileo kaj memordatoj en aprilo 2018 .....	39

<b>Lingvo</b> .....	<b>40</b>
Věra Barandovská-Frank. Tutmondiĝo de portugaliaj kulturo kaj lingvo: Kien nun, kreoloj? (2).....	41
<b>Kulturo</b> .....	<b>50</b>
Stanislav Belov. La formo de akvo – la ideala mito .....	51
Josip Pleadin. Ducent eminentuloj en unu volumo (Recenzo: Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. <i>Nia diligenta kolegaro</i> ) .....	55
Fabrício Valle. <i>Heroldo</i> survoje al akuratiĝo? .....	58
Vicente Manzano-Arrondo. Nur 30 paĝoj (Recenzo: Peter Weide. <i>Mi pequeña gramática de Esperanto</i> ) .....	59
<i>Literatura Foiro</i> regalas per 384 paĝoj en 2018.....	59
Biblioteko de <i>La Ondo</i> (BibLO) .....	60
Ricevitaj gazetoj .....	61
<b>Mozaiko</b> .....	<b>62</b>
La februara krucvortenigmo.....	63
Ho, tiuj advokatoj.....	63
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj.....	64
Kiel aboni <i>La Ondon</i> .....	65

Permo estas ĉi-monata urbo en nia artikolserio “Urboj de Ruslando”, vd. p. 32-35  
(Foto: Ilja Lipin)

## Ni en la reto:

La Ondo de Esperanto: <http://esperanto-ondo.ru/Ind-ondo.htm>

Abono 2018: <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Elŝuteblaj libroj: <http://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libroj.php>

Novaĵretejo La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>


Radio Esperanto: <http://radio.esperanto-ondo.ru/>

Halina en FB: <https://www.facebook.com/halina.gorecka.3>

Aleksander en LJ (ruse): <http://sezonoj.livejournal.com/>

Ruslingva informretejo: <http://rusa.esperanto-ondo.ru/>

## Abonstatistiko 2006-2017



En la pasinta jaro, kiu estis la unua, dum kiu *La Ondo* aperis nur kiel bitgazeto post dek jaroj da kunekzistado de la papera kaj elektronika versioj, nian gazeton abonis 271 personoj en 44 landoj. Ĉi tion oni povas interpreti dumanere. Pesimisme: la suma nombro da abonoj en 2017 estas nur 61,3% de la suma abonnumero en 2016. Optimisme: la nombro de elektronikaj abonantoj duobliĝis. Legu pli detale en la sekvaj du paĝoj.

# La unua senpapera jaro de *La Ondo*

Ĉiuprintempe la redakcio de *La Ondo de Esperanto* kutimas prezenti la abonstatistikon por la antaŭa jaro por vidi kaj analizi la (mal)progreson. Sed tia statistiko por la pasinta jaro estas io nova por ni, ĉar 2017 estis la unua jaro, en kiu *La Ondo* aperis nur kiel bitgazeto post dek jaroj (2007-2016) da paralela kunekzistado de la papera kaj elektronika (pdf) versioj de nia gazeto. Do, ni nur aldonas plian linion al la kutima abontabelo.

Abonjaro	Abonoj, sume	Paperaj	Elektronikaj
2006	545	545	0 (0%)
2007	539	520	19 (3,5%)
2008	573	530	43 (7,5%)
2009	543	491	52 (9,6%)
2010	509	448	61 (12,0%)
2011	556	461	95 (17,0%)
2012	518	415	103 (19,9%)
2013	502	393	109 (21,7%)
2014	508	378	130 (25,6%)
2015	473	347	126 (26,6%)
2016	442	308	134 (30,3%)
2017	271	0	271 (100%)

Ĉi tiun tabelon oni povas interpreti dumaniere. *Pesimisme*: la suma nombro da abonoj en 2017 estas nur 61,3% de la suma abonnumero en 2016. *Optimisme*: la nombro de elektronikaj abonantoj duobliĝis.

Sed estas du pliaj konsiderindaj aspektoj: laborforta kaj financa. Ni vidu ilin.

La nuligo de la papera versio forprenis la neceson ĉiumonate transportadi pezajn kofrojn kun *Ondoj* kaj pasigi noktojn en malkomfortaj kaj ĉiam pli malmultaj busoj cirkulantaj inter la redaktejo en Kaliningrado (Ruslando), presejo en Olsztyn (Pollando) kaj ekspedejo en Kaŭno (Litovio), suprenporti la pezaĵojn al amiko en Kaŭno, en kies loĝejo okazas la enkovertigado, post kelkaj horoj malsuprenporti sakojn kun la pakitaj revuoj kaj transporti ilin al la ĉefpoŝtejo... Rezulte, ni ricevis tri aldonajn tagojn ĉiumonate (dutaga vojaĝado kaj unutage ripozado post la elĉerpa vojaĝo tra tri landoj), ni malpli endanĝerigas nian sanon, kaj krome ni evitas problemojn, kiuj tro ofte okazas ĉe la limoj kaj en la busoj – fakte, sume temas pri unu gajnita monato en 2017!

Malgraŭ la reduktiĝo de la suma abonantaro de 442 al 271 la neta profito de la *Ondo* en 2017 restis la sama (eĉ iomete pli alta), kiel en la lasta papera jaro. Ja dum la lastaj jaroj la pagoj, ricevataj de la paper-abonantoj en Ruslando, Orienta Eŭropo kaj Suda Ameriko (duono da paper-abonoj!) tute ne donis profiton. Krome malaperis ankaŭ la vojaĝkostoj.

3600 eŭroj, enspezitaj en la pasinta jaro, egalas al 300 eŭroj monate – tute kontentiga monata salajro en Ruslanda provinco (ne en Moskvo aŭ Peterburgo), ja milionoj da ruslandanoj vivtenas sin per malpli altaj salajroj aŭ pensioj.

Resume, ni estas kontentaj pri la rezulto (ankaŭ ĉar malpliigis la nombro da rezervaj papergazetoj en nia loĝejo-redakcio-deponejo), kaj ni dankas ĉiuj niajn abonantojn kaj perantojn pro la subteno!

Ŝanĝiĝis la laŭlanda distribuo de la abonoj. En 2016 plej multaj abonantoj de *La Ondo* estis en Pollando (62 abonoj, inter ili nur 3 pdf-abonoj), kiu unuafoje en nia 27-jara historio jarfine superis Ruslandon (59 abonoj, inter ili 7 pdf-abonoj), sed en 2017 plej multaj abonantoj (28) estis en Germanio, kiu kun 42 abonoj (inter ili 18 pdf-abonoj) estis en la tria loko en nia lasta papera jaro. Entute, en 2017 niaj abonantoj estis en 44 landoj.

Jen la laŭlanda plejlisto por 2017 (parenteze estas elektronikaj abonoj en 2016):

Germanio	28 (18)	Japanio	10 (5)
Ruslando	25 (7)	Italio	9 (6)
Usono	21 (14)	Svedio	9 (3)
Hispanio	18 (10)	Britio	8 (5)
Francio	14 (8)	Aŭstrio	6 (5)
Pollando	14 (3)	Nikaragvo	6 (6)
Finnlando	13 (6)	Ĉinio	5 (3)
Brazilo	12 (3)	Nederlando	5 (3)
Belgio	10 (3)	Serbio	5 (4)

La marta statistiko montras, ke ĉi-jare la abonantaro estos je ĉ. 8-10% malpli multa ol en 2017, ĉar pluraj el la antaŭaj paperaj abonantoj, kiuj unuafoje decidis legi la *Ondon* elektronike, trovis la bitgazeton malpli leginda ol la papera gazeto, kvankam ĝi iĝis pli ampleksa kaj pli aktuala.

Tamen ni esperas ricevi ĉi-jare ĉ. 250 abonojn. Vi povas helpi ĉe tio per diskonigo de *La Ondo* en viaj kluboj, en esperantistaj renkontiĝoj, en viaj blogoj, en sociaj retoj, kaj kontribuante al nia Abonhelpa Fonduso.

**Halina Gorecka** (eldonanto)

**Aleksander Korĵenkov** (redaktoro)

**La jarabono por 2018 kostas nur 15 eŭrojn**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# *Eventoj*



24-a de marto

MEA  
MASI

**RET-babilejo**

gastigas ĉi-sabate:  
**Mirina, Anjo, Raja, Alisa**

La 24an de marto aktivuloj de la Moskva Esperanta Asocio MASI sukcese lanĉis novan komunikan projekton Ret-babilejo. La sekvaj sesioj okazos la 28an de aprilo kaj la 12an de majo ĉe <https://retbabilejo.weebly.com/>

# Zamenhof-ekspozicio ankaŭ en Panevėžys

Post Vilno kaj Kaŭno la ekspozicio, dediĉita al la centjariĝo de la morto de Ludoviko Zamenhof, venis al Panevėžys, kie ĝi estas eksponata en la urba municipa palaco. La 13an de marto 2018 okazis solena inaŭguro de la ekspozicio, kiun partoprenis ĉirkaŭ 50 personoj – duone esperantistoj kaj neesperantistoj, inkluzive de multaj gravuloj de Panevėžys.

La inaŭguran ceremonion gvidis la vicprezidantino de la urba esperantista klubo “Revo” Danutė Kriščiūnienė. Komence de la inaŭguro kaj dum paŭzoj violone ludis Sigita Railaitė kaj kantis en Esperanto Vilius Šidlauskas. La enkondukan paroladon pri Ludoviko Zamenhof kaj pri Esperanto faris la prezidanto de Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas. Sekvis multaj parolantoj kaj salutantoj:

- Vicdirektoro de la Pola Instituto en Vilno, konsilanto de la Pollanda ambasado en Litovio Paweł Krupka.
- Episkopo de Panevėžys Jonas Kauneckas.
- Vicurbestro de Panevėžys Petras Luomanas.
- Prezidantino de la urbkonsilia komitato pri edukado kaj kulturo Loreta Masiūnienė.
- Prezidanto de la juda komunumo en Panevėžys Gennady Kofman.



Foto: Rita Kasparienė

- Gvidantino de la urba Eŭropa informcentro Alina Misiŭnienė.
- Gvidantino de la urba eduka centro por plenkreskuloj Virginija Juknienė.
- Konsilantinoj de parlamentanoj Guoda Burokienė kaj Povilas Urbšys elektitaj en Panevėžys Vaida Pečeliŭnaitė kaj Jŭratė Kavaliauskienė.
- Reprezentantoj de Universala Pacfederacio Jŭratė Chocholskienė kaj Vladimiras Chocholskis.

Lernantoj de surdmutula lernejo sub la gvido de ilia instruisto Vilius Glušokas montris, kiel surdmutuloj komuniĝas en Esperanto. Fine de la ceremonio la prezidantino de “Revo” Vida Kulikauskienė dankis ĉiujn pro la partopreno kaj kontribuo al la aranĝo. Veterana esperantistino Palmira Lukoŝevičienė, kiu mem eldonis multajn librojn en Esperanto, ekspoziciis lernolibrojn de Esperanto. Fine ĉiuj estis regalitaj per kafo, teo kaj dolĉaĵoj.

Pri la inaŭguro anticipe informis multaj amaskomunikiloj de Panevėžys kaj kelkaj tutlandaj. La informado daŭras. La ekspozicio finiĝos la 15an de aprilo.

Sekvatage la prezidanto de LEA Povilas Jegorovas kaj la vicprezidantino de la klubo “Revo” Danutė Kriŝčiŭnienė havis kelkajn gravajn renkontiĝojn lige kun la 55aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-55), kiuj okazos sekvont-jare en Panevėžys.

**Povilas Jegorovas**

## NDK: Prezento en Vilno

La 12an de aprilo en la konferenca salono de Litovia Ĵurnalista Domo en Vilno (strato Jogailos 11, la 3a etaĝo) okazos prezento de la nova enciklopedio *Nia diligenta kolegaro: Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj* (NDK). La enciklopedion prezentos ĝiaj aŭtoroj: Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov el Kaliningrado. Okaze de la prezento oni povos aĉeti la libron kun granda rabato kontraŭ nur 16 eŭroj (anstataŭ 30 eŭroj) kaj ricevi aŭtografon de la aŭtoroj.

### En la programo:

1. Prezento de NDK, respondoj al la demandoj;
2. Regalo kaj glaso da vino.

Pri via partopreno en la prezento bonvolu anticipe informi al la respondeca sekretariino de Litova Esperanto-Asocio Irena Alijoŝiūtė telefone +370 686 69875 aŭ rete irena.alijosiute@gmail.com.

Komenco je 17h30.



**Povilas Jegorovas**

Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio

Pli detale pri NDK: <http://esperanto-ondo.ru/Knigi/Kniga120.htm>

## Praktiki Esperanton sen forlasi la hejmon!

Kiam vi ne havas proksimajn Esperanto-renkontiĝojn apude, aŭ mankas tempo por vojaĝi, aŭ vi jam konas ĉiujn esperantistojn en via ĉirkaŭaĵo kaj volas renkonti novajn homojn sen vojaĝi malproksimen – nia Ret-babilejo estas la solvo por vi!

La 24an de marto amikiĝemaj babilemoj de la Moskva Esperanta Asocio MASI malfermis retan gastĉambron kaj organizis tie deĵoradon dum ok horoj por ebligi al komunikiĝemaj esperantistoj de ĉiu tempozono praktiki kune Esperanto-paroladon. La ideo fontis el la projekto “EKPAROLU!”, organizita de Katalin Kováts en la retejo [www.edukado.net](http://www.edukado.net), jam atinginta pli ol mil parol-sesiojn kun komencantaj kaj progresantaj esperantistoj. Sed kadre de Ekparolu! ĉiu uzanto havas nur dek sesiojn. Kaj kio plu? Multaj studentoj post Ekparolu! ne havis optimisman respondon al tiu ĉi demando. Nun ĝi estas! Ja MEA MASI lanĉis por vi la Ret-Babilejon!



La unua provo plene sukcesis! Dum la tuta tempo la ĉambro ne estis malplena eĉ unu minuton! Venis gastoj de la tuta mondo – el Rusio, Brazilo, Hungario, Anglio, Ĉilio, Litovio... La tempa diferenco de aliĝintoj kompare kun Moskvo estis de -6 ĝis +4 horoj! La gastigantoj ĉi-foje estis Alisa (tiutempe en Sofio, MEA MASI, lerninto de Ekparolu!), Anjo Amika (Ĉaŭdefono, Svislando, instruisto de Ekparolu!), Mirina/Irina Gonĉarova (Odincovo, MEA MASI, instruisto de Ekparolu!) kaj Raja/Rafija Kudrjavceva (Jekaterinburgo, EK “Arĝenta Flamo”). Ĉiu gastiganto havis sian propran aliron al la gastigado.

Alisa proponis al la gastoj diskutprovokajn fotojn, provis vortludi kaj eĉ instrui origamion. Anjo, konata Esperanto-kantistino, kiu je nivelo C2 dipomiĝis pri la temo “Kiel influas la Zamenhofa ideologio la Esperantan muzikan kulturon”, kompetente kaj entuziasme rakontis pri historio de la Esperanta muziko. Ŝian prelegon kompletigis Vida Kulikauskienė (Panevėžys, Ekparolu!) per rakonto pri la litova grupo *Sepa kaj Asorti*. Raja mergis nin en la mondon de Esperanta poezio. Granda plezuro estis aŭskulti ŝian belan melodian deklamadon kaj prononcon! La temon subtenis profesoro Adonis Saliba (San-Paŭlo) kaj Galina Markelova (Sankt-Peterburgo), kiuj rapidis por preni la ŝatatajn poeziaĵojn de librobretoj kaj voĉlegi ilin.

**Ĝi estas demonstra versio de la 69-paĝa aprila *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

21 mar 2018 la edukministerio de Ĉinio permesis starigi E-fakon de la Zaozhuang-a Universitato kun kvarjara bakalaŭra instruado de Eo k la angla lingvo en la sferoj de komunikado kaj interreta komercado. (Landa Agado)

La nederlanda junulara teatrogrupo *House of Nouws* kreis teatraĵon pri Eo *La plej bona ideo por ĉiuj* k kvarfoje prezentis ĝin al plena salono en la prestiĝa tutsemajna kultura festivalo en la urbo Den Bosch. (Libera Folio)

Laŭ interkonsento kun Feminisma Ea Movado *Literatura Foiro* ĉeestis kun propra korrespondantino la 40an Internacian Festivalon de Femina Filmo, okazinta meze de marto apud Parizo. (HeKo)

12 mar 2018 en la kulturcentro Blanquerna (Madrido) estis prezentita la Ea libro *Tagoj kaj ruinoj* de la kataluna E-intelektulo Jaime Grau Casas, verkita dum lia plurjara restado en prizonkoncentrejoj en la sudo de Francio post la hispana interna milito. (La Bitbulteno)

13 mar 2018 en la elementa lernejo Baiyangshujie en la urbo Taiyuan (prov. Ŝanŝio, Ĉinio) okazis E-kurso por 20 lernejoj instruistoj, plejparte junuloj diplomiĝintaj en universitato antaŭ unu aŭ du jaroj; la kurson gvidis "Jatina" Zhang Yating. (El Popola Ĉinio)

24 mar 2018 en la kolegio Beau-Soleil (Vaŭdo, Svislando) kadre de la speciala programo pri novaj vojoj por la mondo Mireille Grosjean k Sonia Daubercies demonstris filmon pri Eo k prezentis Eon al kvin grupoj per 30-minutaj kursetoj. (Landa Agado)

Post intensa gazeta (en *Haaretz*), strat-anonca k fejsbuka informkampanjo (kiu kostis ĉ. 2000 eŭrojn) 12 mar 2018 en la Tel-Aviva E-klubo komenciĝis ĉiusemajna 15-leciona E-kurso de E-Ligo de Israelo, kiun gvidas d-ro Doron Modan por pli ol 30 personoj. (Amri Wandel)

Estas fondita la Uzbekia E-Asocio (UzEA), en kiu membras 12 e-istoj, ĉefe el Taŝkento k Samarkando; la asocion kungvidas Gafur Mirzabajev (prezidanto), Umid Mirzabajev (vicprezidanto), Aziz Riŝisjev (vicprezidanto) k Beĥzod Ĥamidĥodĵajev (ĝenerala sekretario), kiuj nun preparas la registradon de UzEA. (EKO)

La Komitato de UEA en reta voĉdonado per 18 voĉoj "por", 14 "kontraŭ" k 4 sindetenoj akceptis la proponon de la Elekta Komisiono fiksi la nombron de aldone elektotaj estraranoj je du personoj; en la voĉdonado kandidatas Brunetto Casini, Huang Yinbao (Trezoro), Barbara Pietrzak, Orlando E. Raola k Amri Wandel; la Elekta Komisiono rekomendas "elekti Trezoro-n kiel estraron pri Financoj k Orlando-n Raola kiel estraron pri Kulturo, Kongresoj, Bibliotekoj, Eldonado aŭ Scienca k Faka Agado". (Komitato-de-UEA)

18 mar 2018 vespere okazis la 1000a parolsesio de la projekto Ekparolu!; la jubilea konversacio disvolviĝis inter la litova onkline Vida Kulikauskiene k la estona nevo Piret/Luluu; nun en la projekto estas 61 geonkloj, kiuj interparolis kun 130 genevoj, el kiuj 37 jam finis siajn studojn kun 10-20 sesioj, kaj 93 nun laboras aŭ pretiĝas ekhavi sesion. (Edukado.net)

Je 31 mar 2018 al la 103a UK de Eo en Lisbono aliĝis 1279 e-istoj el 72 landoj; plejmulte el Francio 218, Germanio 102, Brazilo 101, Japanio 84, Pollando 72, Hispanio 63, Belgio 42, Koreio 40, Italio 35, Nederlando 33, Usono 32, Ruslando 31, Litovio 30, Britio 29, Portugalio 29, Hungario 28. (uea.org).

# Tribuno



“Polyglot Gathering”, la plej grava kaj amasa renkontiĝo de plurlingvuloj, kiun antaŭ kelkaj jaroj kunprojektis kaj daŭre kunrealigas esperantistoj, ĉi-jare denove okazos en la ĉefurbo de Slovakio. (Vd. p. 27-28)

## Plurlingvula kunveno denove okazos en Bratislavo

Kiu estas la plej granda renkontiĝo de plurlingvuloj (poliglotoj)? Jes ja, ĝuste tiu, kiun kreis kaj daŭre organizas esperantistoj! Ĉi-jare denove okazos en la Ekonomika universitato de Bratislavo monda evento: Poliglota kunveno (Polyglot Gathering), dum kiu ĉiujare renkontiĝas lingvoŝatantoj. Ili averaĝe scipovas ses lingvojn, kaj dum la kunveno estas kutime aŭdi ankaŭ lingvojn, pri kiuj vi neniam aŭdis antaŭe.

Kunveno de plurlingvuloj ([www.polyglotbratislava.com](http://www.polyglotbratislava.com)) okazos en Bratislavo ekde la 30a de majo ĝis la 3a de junio 2018 sub la aŭspicio de Martina Lubyová, ministrino de edukado de Slovakio. Partoprenos ĝin pli ol kvincent poliglotoj el pli ol kvindek landoj.

La poliglotojn atendas kvar tagoj plenaj de prelegoj kaj prezentoj, dum kiuj oni kundividos siajn spertojn pri lingvolernado kaj traktos ankaŭ diversajn temojn, kiuj rilatas al lingvoj. Tamen temas ne pri formala konferenco, sed pri “renkontiĝo” en la laŭvorta signifo: la prelegojn akompanas interesa vespera programo, ekzemple: plurlingvaj ludoj kaj kvizoj, multlingvaj koncertoj, internacia vespero kaj similaj. La ĉefa parto estos prelegoj de poliglotoj pri diversaj temoj rilataj al lingvoj kaj lingvolernado, kiuj estos prezentataj en pluraj lingvoj de la mondo. La partoprenantoj tiel kundividigas metodojn por lerni grandan nombron da lingvoj, teni ilin aktivaj, plibonigisian prononcadon ktp. Ŝatataj estas ankaŭ metiejoj, dum kiuj oni prezentas konkretan lingvon el la vidpunkto de homo, kiu volas lerni ĝin kiel fremdan lingvon. Ĉi-jare estos ankaŭ aparta metieja ĉambro, kie oni instruos ion ajn, en konkreta/j lingvo/j (ekzemple, trikadon, dancadon ktp.). Dum la renkontiĝo okazos ĉ. 100 prezentadoj en kvar sekcioj pri diversaj temoj en pluraj lingvoj (ankaŭ en Esperanto).


La renkontiĝo de poliglotoj estas neformala aranĝo, kiu celas plifortigon de la komunumo de poliglotoj. Inter la prelegoj kaj dum la vespera programo oni diskutas pri diversaj temoj en multaj lingvoj. Oni elektas ilin laŭ lingvoj, kiujn partoprenanto mencias sur sia nomŝildo (jes ja, estas eĉ tiaj, por kiuj la nomŝildo ne sufiĉas, ĉar ili scipovas komuniki eĉ en 30-35 lingvoj!). Unu “kuriozaĵo” estas, ke en la ripozejo antaŭ la universitato troviĝas t. n. “Senangla areo”, kie estas malpermesite uzi la anglan! Ĉi-tiun regulon oni volontule obeis jam pasintjare, kaj partoprenantoj mem opiniis ĝin bona ideo kaj petis ĝin ripeti. En la aranĝo oni povas aŭskulti interŝanĝon de impresoj pri la amuzado aŭ kultura programo en la latina aŭ la diskuton pri interesa prelego en la lingvo tamang. Kutime ankaŭ Esperanto estas bone reprezentata inter la lingvoj de poliglotoj. Laŭ la statistiko pli ol kvarono de partoprenantoj posedas ĉi tiun lingvon.

**Ĝi estas demonstra versio de la 69-paĝa aprila *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# *Urboj de Ruslando*



**Permo (Пермь), la plej orienta urbo-milionulo en la Eŭropa parto de Ruslando, fondita en 1723 estas la ĉefurbo de Perma regiono (2 milionoj 620 mil loĝantoj), grava industria, scienca, kultura kaj trafika centro de Okcidenta Uralo. Ĝuste en Permo en 1916 estis fondita la unua universitato en Uralo.**

# *Urbo, kie komenciĝas Eŭropo*

Kiel ĉiu provinca urbo, Permo (ruse: Пермь) kredas, ke ĝi ne estas la lasta punkto en la landa historio. Tio estas vera. La regiono estis unue menciita en manuskriptoj de antikvaj historiistoj kaj geografoj kiel Rifeo aŭ Hiperboreujo. Skandinavaj fontoj ankaŭ menciis ĝin: la lando en nordoriento de Rusujo, riĉa je feloj, arĝento kaj legendoj pri strangaj homoj kaj bestoj, estis nomita Biarmio. Poste finnaj-ugraj triboj de la nordo de Rusujo donis al la lando la aktualan nomon: el “perämaa” rezultis “malproksima tero” akirita kiel la nomo de tuta regiono. Ankaŭ la nomo de ĝia ĉefurbo, la urbo Permo ĉe la okcidentaj deklivoj de la Urala montaro, dislimiganta, kiel ni scias, du partojn de la mondo – Eŭropon kaj Azion. Lokanoj foje ŝercas patose, ke ĝuste de ilia urbo, je 1500 kilometroj oriente de Moskvo, komenciĝas Eŭropo.

Je la 15a jarcento, ĉi tiu lando, pli ol kvincent kilometrojn longa kaj larĝa, tute plene konsciis sin kiel sendependan kaj riĉan teritorion Permo la Granda. En 1430 ĉi tie estis trovita salminejo, danke al kiu la loĝantoj ricevis la moknomon “Salaj oreloj”. Post 25 jaroj la rusortodoksa kristanismo estis establita ĉi tie, estis konstruataj preĝejoj, aperis monaĥejoj. Baldaŭ tra ĉi tiuj terenoj estis konstruita la cara vojo al Siberio, danke al kiu komenciĝis la disvolviĝo post la Urala montĉeno.

La malproksimeco de la kulturaj kaj civilizaciaj centroj, malfacila kaj malproksima vojo ĉi tien, kondukanta tra sovaĝaj arbaroj, riveroj, ŝipaj trenejoj tra montoj, maltrankvilaj vivkondiĉoj kreis siaspecan persistan kaj memstaran karakteron de la loĝantoj de Permo la Granda. La rezultinta miksaĵo de lokaj popoloj, kiuj parolis malsamajn lingvojn, konfesis kristanismon kaj diversajn paganajn kredojn, poste ankaŭ islamon, alkiutimigis la loĝantojn al toleremo pri malsamaj opinioj kaj neskueblon pri ilia propra vidpunkto.

Spicon al ĉi tiu homa koktelo aldonis la periodo, kiam en la Perma provinco aperis malliberuloj, ekzilejoj, kaj – en la tempo de Sovetunio – punlaborejoj. Multaj eksprizonuloj ekloĝis ĉi tie, aldoninte en lokaj vivmanieroj etoson de tradicioj de malliberejo, kies ora regulo ĉiam sonis kiel “Ne kredu. Ne timu. Ne petu”.

Tamen malliberejoj estis ne nur negativa faktoro loka: ofte multaj homoj venigitaj al la regiono de Permo estis homoj de altaj rango kaj eduknivelo. La regiono de Permo ĉiam estis nomata kiel “ursa angulo”, danke al la kulto de la urso inter la lokaj popoloj, kaj ĝia percepto flanke de la loĝantoj de la landa centro. Ĉi tiu proverbo akiris oficialan formon: sur la blazonoj de la urbo Permo kaj de la Perma regiono estas urso. Sur sia dorso ĝi tenas la Biblion, kio estas simbolo de “la kristana klerigado kiu ekbrilis al la loĝantoj ĉi tie”.

Post vagado laŭ kelkaj setlejoj de Permo la Granda, en 1723 la centro de la Perma provinco estis fiksita ĉe la nuna situo de la urbo Permo, kie antaŭe aperis fabrika vilaĝo proksime de kupra fandejo. Rapide ĝi iĝis la centro de la metalurgia kaj mina industrioj de Uralo. La urbo kreskis, aperis ŝipkompanioj ĉe la rivero Kama.



La domo de Gribuŝin, mencita en *Doktoro Jivago* (Foto: Vadim Biserov)

Fine de la 19a jarcento estis konstruita la unua fervojo en Uralo, kunliginta Permon kun la azia urbo Jekaterinburgo, ĝia eterna historia rivalo por la potenco kaj influo.

En la samaj jaroj en Permo aperis elektra lumigado, telefono; estis konstruita la urba teatro, kiu iĝis unu el la plej ŝatataj amuzejoj ne nur por la urba elito sed ankaŭ por nenobeloj. Ĝuste ĉi tie formiĝis kiel kreema persono kaj ŝatanto de baleto Sergej Djagilev, la posta organizanto de la “Rusaj Sezonoj” en Parizo. Ĉi tien, al Permo, venis en 1841 jaro la brita geologo Roderick Murchison por ampleksa esplorado, kaj poste, omaĝe al ĉi tiu regiono li donis la nomon “permio” al la lasta periodo de paleozoiko. Nun en Permo estas monumenta signo pri li en la formo de granda ŝtono kun pormemora surskribo. Eĉ la estonta fondinto de la konata premio, Alfred Nobel, havis sian propran petrolkomercon ĉi tie, en Permo.

**Ĝi estas demonstra versio de la 69-paĝa aprila *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# *Arkivo*



**La 3an de marto 2018 forpasis la plej fama litova operkantisto Virgilijus Noreika, kiu grave kontribuis ankaŭ al la Esperanto-kulturo.**



## Forpasis Virgilijus Noreika, homo kiu sonigis Esperanton

**La 3an de marto 2018 forpasis la plej fama litova operkantisto de la Sovetunia periodo tenorulo Virgilijus Noreika.**

Li naskiĝis la 22an de septembro 1935 en la litova urbo Šiauliai. Dum 1949-1953 li lernis en la muzika lernejo Juozas Tallat-Kelpša (Vilno), dum 1953-1958 en la Litova Konservatorio. Dum 1957-1975 Noreika estis solisto en la Litova Teatro de Opero kaj Baletto, poste profesoris pri kantado en Litova Ŝtata Konservatorio (Muzika Akademio) kaj estis arta gvidanto de la kantostudejo en la Litova Teatro de Opero kaj Baletto. Noreika estis laŭreato de multaj internaciaj konkursoj, iĝis Popola Artisto de Sovetunio (1970), ricevis la ordenon “Pro porlitoviaj meritoj”, la Ordenon de Gediminas kaj aliajn distingojn de Sovetunio, Litovio, Ruslando (medalo “Puŝkin”, 2015) kaj aliaj landoj.

Virgilijus Noreika, impresvoĉa tenora grandulo, kantis sur scenejoj de multaj mondaj teatroj: en La Granda (“Boljšoj”) Moskva Teatro (pli ol 50-foje), en Berlino,

Parizo (Grand Opera), Bonaero, Stokholmo, Varsovio, Prago, Talino, Budapeŝto kaj aliaj urboj.

La patro de la kantisto, tajloro Leonas Noreika, estis esperantisto ekde 1923. Li aktivis en organiza kaj varba laboro por Esperanto en Ŝiauliai, estis membro de SAT kaj UEA. Post la Dua Mondmilito li kun sia familio ekloĝis en Vilno. En 1956 li helpis al Vilnaj esperantistoj akiri ejon por la urba Esperanto-rondeto (poste Esperanto-klubo), organizis kaj gvidis Esperanto-kurson por universitataj studentoj. Lia filo Virgilijus ne fariĝis esperantisto, sed ĉiam simpatiis kun esperantistoj.

En 1961 mi, ĵusa studentiginto en la Vilna Universitato, konversaciis kun la direktoro de la Vilna Sondiska Studio (filio de la Moskva Studio “Melodija”). Tiam aperis la ideo entrepreni preparon de sondisko en Esperanto, sed la direktoro dubis, ĉu “Moskvo permesos”, ja Esperanto en Sovetunio funkciis nur duonoficiale. Mi sciis pri la esperantisteco de la patro de la impete populariĝanta kantisto, kiu “estis aprecata kaj ŝatata eĉ en Moskvo”. Ni interkonsentis, ke mi kontaktos la kantiston pri la disko, kaj la estro kontaktos la estraron de “Melodija”.

Antaŭ renkontiĝi kun la kantisto, mi iris al lia patro, kiu pro sia malsano ne plu vizitadis Esperanto-kunvenojn. La patro certigis, ke li konvinkos la filon kanti en Esperanto. Kun kelkaj tekstoj de tradukitaj litovaj popolkantoj mi iris al la hejmo de Virgilijus Noreika. Li tre afable akceptis min, elektis tri kantojn el la proponitaj kaj ekdeziris, ke estu tradukita ankoraŭ kanto pri anaseto, tre ŝatata de li. Kiam venis konsento de Moskvo pri la sondisko kaj ties enhavo, en la Vilna Filharmonio okazis la sonregistrado. Mi ĉeestis kiel kontrolisto pri korekta Esperanto-prononcado. Post la registrado de la unua kanto, en la teknikan ĉambron venis la opera majstro, aŭskultis sian kantadon kaj kontente konkludis: “Esperanto sonas bonege – kiel la itala!”. En decembro 1961 la sonfabriko “Ligo” en Rigo eldonis la diskon “Litovaj popolaj kantoj kaj dancoj”.

Kvankam surbendigitaj estis kvar kantoj en Esperanto, en la disko aperis nur tri – la kantisto severe traktis fuŝa sian plenumon de la kvara kanto (aŭ li traktis ĝin netaŭga?). Nu, mi sentis neniun missonon. Krom tri kantoj, plenumitaj de Noreika, en la disko aperis ses instrumentaj popolaj muzikaĵoj.

Tiel en Sovetunio aperis la unua Esperanto-disko, reeldonita jam en 1964. Ĝi akiris bonan renomon inter eksterlandaj esperantistoj kaj pavimis la vojon al la dua Sovetunia Esperanto-disko kun 12 kantoj “Litova kanto en Esperanto” (1972).

Inter la adorantoj de la talento de la ĵus forpasinta opera grandulo Virgilijus Noreika estas kaj restas ankaŭ la Litovia esperantistaro, ja li dum la obskura Sovetunia epoko kortuŝvoĉe sonigis Esperanton tra la mondo. Aldonindas, ke Virgilijus Noreika estis membro de la Honora Komitato de la 90a Universala Kongreso de Esperanto en Vilno en 2005.

**Vytautas Šilas**

Ĉiujn muzikaĵojn de la disko oni povas aŭskulti, interalie, en

<http://www.epaveldas.lt/object/recordDescription/LNB/C1B0001612553>

# Jubileoj kaj memordatoj en aprilo 2018

1. Antaŭ 150 jaroj naskiĝis **Pál Lengyel** (1868-1898-1932), hungara presisto kaj esperantisto, teknika redaktoro de Presa Esperantista Societo en Parizo (1905-14), eldonanto de *Lingvo Internacia* (1899-1904), redaktoro de *Juna Esperantisto* (1909-14), redakciano de *Literatura Mondo* en ties unua eldonperiodo (1922-26), membro de la Lingva Komitato ekde ties fondo (1905) ĝis sia morto (1932), membro de la Akademio de Esperanto (1910-28), honora prezidanto (1924-32) de Hungarlanda Esperanto-Societo, aŭtoro de *Libro de l' humoraĵo* (1899, bitlibro 2002) k. a.

1. Antaŭ 85 jaroj naskiĝis **Tyburcjusz Tyblewski** (1933-1951-1998), pola montara savisto, pedagogo, instruisto, psikologo kaj esperantisto; senatano de AIS k dekanato de ties morfoscienca sekcio, redaktoro de *Pola Esperantisto* meze de la 1980aj jaroj, aŭtoro de *El la valo* (1981), *Fihonestulo* (1983), *Skizo pri personeco de esperantisto* (1985), *Psikosocia problemaro de internacia turismo* (1988) k. a., tradukinto de verkoj de Tadeusz Rózewicz, Sławomir Mrożek, Czesław Miłosz k. a.

7. Antaŭ 25 jaroj mortis **August Weide** (1904-1993), germana esperantisto, Csehmetoda instruisto en pluraj landoj, aŭtoro de la ampleksa lernolibro *Esperanto laŭ la patrina metodo* (1979), kuntradukinto de la grava seksologia libro *ABZ de amo* (1972) de Inge kaj Sten Hegeler.

16. Antaŭ 115 jaroj naskiĝis **Kenelm Ralph Creusé Sturmer** (1903-1922-1960), konata kiel Kenelm Robinson, brita dentoteknikisto kaj esperantisto, recenzanto kaj beletristo; aŭtoro de *Por recenzo!* (1930), *Se Grenereto...* (1930), *Apud stacidomo Victoria* (1930), *El la notlibro de praktika esperantisto* (1934) k. a., tradukinto de *Princino de Marso* (1938) de Edgar Rice Burroughs k. a.

27. Antaŭ 110 jaroj naskiĝis **Arnošt (Ernesto) Váňa** (1908-1918-1998), slovak forstisto, vegetarano kaj esperantisto, fondinto de *Slovaka Esperantisto* (1946) k de Esperanto-kooperativo (1947, konfiskita de la ŝtato), longtempa prezidanto de Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio k redaktoro de *Esperantista Vegetarano*, aŭtoro de lernolibro de Esperanto por slovakoj (1946).

29. Antaŭ 85 jaroj naskiĝis **Milan Zvara** (1933-1949-2002), kemiisto, naturprotektanto, vojaĝanto, mikologo, fotisto kaj la plej konata esperantisto en Slovakio; Esperanto-instruisto, prezidanto (1977-83, 1987-90) kaj vicprezidanto (1983-87) de Slovaka Esperanto-Asocio, prezidanto de Slovaka Esperanta Federacio (2001-02), komitatano de UEA (1982-95), estrarano (1975-84, 1987-90) kaj ĝenerala sekretario (1990-2002) de Monda Turismo, organizanto de multaj Esperanto-vojaĝoj, ekskursoj kaj renkontiĝoj, direktoro de la Esperanto-Centro en Poprad, kunaŭtoro de koresponda kurso de Esperanto por slovakoj (kun Eduard Tvarožek, 1990).

**Aleksander Korjenkov**

# Lingvo



Renkonte al ĉi-jara UK en la ĉefurbo de Portugalio ni proponas studon de Věra Barandovská-Frank pri kreoloj, kreĝintaj pro la portugala koloniado en Afriko, Azio kaj Ameriko.

(Sur la bildo: Vasco da Gama navigas, serĉante vojon al Hindio – ilustraĵo de Ernesto Casanova por *La Luzidoj*, 1880;


<https://pt.wikipedia.org/wiki/Ficheiro:Vascodagama.jpg>)

# Tutmondiĝo de portugaliaj kulturo kaj lingvo: Kien nun, kreoloj? (2)

de Věra Barandovská-Frank

## 4. VIGLA KREOLO: LA KABOVERDA

La Kaboverda (Crioulo de Cabo Verde, Kaboverdiano, Kauberdianu, Kiriolu), la plej vigla el la portugalecaj kreoloj, fakte estas aro da variantoj/dialektoj<sup>1</sup>, konforme al geografia deveno:



Figuro 6: Kaboverdo. <https://www.infoescola.com/afrika/cabo-verde/>

La insularo (kaj konforme la lingvovariantoj/dialektaro) konsistas el du grupoj: 1) Insuloj super la vento (Islas do Barlavento): Santo Antão, São Vicente, Santa Luzia, São Nicolau, Sal, Boa Vista kaj tri insuletoj; 2) Insuloj sub la vento (Islas do Sotavento); Santiago (São Tiago), Brava, Fogo, Maio kaj du insuletoj. Ene de la du insulgrupoj kaj ties karakterizaj lingvovariantoj, ankaŭ ĉiu insulo havas siajn lingvajn specifaĵojn.

### 4.1. Historio

En 1456 albridiĝis Vicente Dias en Boa Vista kaj Fogo, en 1460 António da Noli en Santiago, en 1462 Diego Alfonso malkovris Santa Luzia, Santo Antão kaj São

Vicente. La insularo ne estis enloĝata. La unua portugala setlejo, Cidade Velha (= malnova urbo, origina nomo Ribeira Grande = granda roĵo) fondiĝis sur la insulo São Tiago. La kondiĉoj por argikulturo ne estis tre bonaj, sed la strategia geografia pozicio inter Afriko, Eŭropo kaj Ameriko estis avantaĝa por komerco, precipe kun sklavoĵoj. Oni alportadis tien sklavoĵojn el Afriko, instruis al ili elementojn de metioj kaj iom da Portugala, por pluvendi ilin profitdone al Sudameriko kaj al Eŭropo tra la havenoj de Lisbono kaj Sevilo. Ĉiuj insuloj estis poste enloĝataj kaj jam en 1587 unuigitaj en unu portugala kolonio. En 1586, Kaboverdo estis detale priskribita en la unua libro de verko "Saudades da Terra" de Gaspar Frutuoso, pastro kaj humanisto el Madeira. Ekde la 17-a jc., la insularo estis preferata celo de piratoj.

Malproksime de protekto de la portugala regno, la kaboverdanoj tiam komencis evoluigi sian propran identecon. Anonima portugalo en la jaro 1784 asertas, ke ili parolas iaspecan "rustikan portugalan lingvon" kiu estas utila por ĉiutagaj aferoj, sed tiom stranga, ke oni ne povas skribi ĝin. Aliflanke, la skribo tiam ne gravis, ĉar la plej granda parto de la loĝantaro estis malriĉa kaj ne povis sendi siajn infanojn al lernejoj, des malpli al portugaliaj universitatoj.

Sklavoj ofte fuĝadis kaj ekloĝadis en internaj partoj de la insuloj. La sklavovendo estis haltigita nur en 1867. Sur la insulo Fogo (= fajro) troviĝas vulkano, kiu ekde la 17-a jc. ĝis 1951 multfoje erupciis, la loĝantaro do fuĝadis al aliaj insuloj. Dum jarcentoj oni detruadis lokajn arbarojn por vendi lignon kaj pligrandigi kampojn, kio rezultis en dezertigo de la pejzaĝo kaj sekve malsatego, pro kiu kaboverdanoj ofte elmigris, ĉefe al Senegalio kaj Santomeo k. Principeo. Tiel la unuopaj kreolvariantoj influis sin reciproke. Simile, en la 19-a jc., haveno Mindelo sur São Vicente akiris gravan pozicion kiel karbo-deponejo por ŝipoj kaj kiel transira centro de telegrafado inter Afriko kaj Nordameriko, tiam enloĝis tie laboristoj el aliaj insuloj. En la duono de la 20-a jc., Kaboverdo aliĝis al kampanjo de Gvineo Bisaŭa por sendependeco, kiun ĝi akiris, post pacaj intertraktadoj kun Portugalio, en 1974. Dum la Unua Respubliko (1975-1990) oni komencis subteni la kreolon, gepatran lingvon de la loĝantaro, per radioelsendoj, gazetaj artikoloj kaj instruado en pedagogia lernejo. En 1999, la kaboverda parlamento rekonis la gravecon de la kreolo kaj proponis oficialigi ĝin samrange kun la Portugala. Bedaŭrinde, la parolantoj de unuopaj variantoj/dialektoj ĝis nun ne interkonsentis pri akceptebla komuna kompromisa formo (kiel okazis ekzemple en Svislando kun la Retoromanĉa, normigita surbaze de la plej gravaj dialektoj).

**Ĝi estas demonstra versio de la 69-paĝa aprila *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# *Kulturo*



Revenas nia malofta kina rubriko, en kiu Stanislav Belov prezentas sian opinion pri *La formo de akvo* (The Shape of Water), kiu la 4an de marto ricevis “Oskaron” kiel la plej bona filmo de la jaro.

# La formo de akvo – la ideala mito

Mi ŝategas verkojn de Guillermo del Toro, sed *La formo de akvo* ne tro fascinis min. Kial? Mi ne scias. Eble mi atendis tro multe de la Oskar-premiitaĵo aŭ simple al kutimiĝis al pli homaj, realismaj historioj. Tamen mi devas agnoski – li kreis perfektan miton.

## Purigistinoj kontraŭ sekretaj servoj

Filmoj de Guillermo del Toro plejparte aspektas kiel fabeloj, ĉefe kruelaj kaj teruraj. Tamen sub la horora fasado sin kaŝas profundaj artaj esploroj rilataj al morto, infanaj timoj, patrina amo, fideleco kaj sinofero. Kiel scenejon la reĝisoro uzas nuntempajn, bone konatajn al ni lokojn kaj periodojn, el kiuj la plej malproksima estas la Hispana Enlanda Milito de la 1930aj jaroj. La hororaĵoj invadas nuntempon ĉefe el interno de la homaj animoj, kvankam ofte homoj mem aspektas kaj agas ne malpli terure ol la fantaziaj estaĵoj.

Ĉi-foje la dramo disvolviĝas en la usona Baltimoro baldaŭ post la Dua Mondmilito, kiam la nova – feliĉe Malvarma – milito okupis pensojn de la politikistoj kaj gvidataj de ili nacioj. En sekreta laboratorio militistoj okazigas eksperimentojn. Iun tagon ili alportas vitrujon, en kiu loĝas enigma estaĵo – homaspekta amfibio, kaptita en Amazonio, kie lokaj triboj adoris ĝin kiel dion. Inteligenta sciencisto (varbita de sovetia sekretservo) kompatas ĝin, deziras observi kaj esplori, sed la durocerbaj epoletuloj preferas pli rapidan kaj radikalajn solvon – dissekcii la estaĵon por kompreni ĝian internan strukturon. Sovetiaj spionoj klopodas preventi pereon de la valora vivaĵo (eble por pereigi ĝin propramane), sed kiu povas nuligi la ordonon?

Du purigistinoj. Vi ne mislegis – la planojn de ambaŭ sekretservoj detruas du purigistinoj, kiuj laboras en tiu ĉi loko. La korpulenta babilulino Octavia Spencer (ni memoras ŝin el *La Servistaro*) kaj la fiŝaspekta mutulino Sally Hawkins (eble vi memoras ŝin el *Paddington*). La lasta enamiĝas je la enigma kaptito, same sola kiel ŝi, kaj ekas la frenezan planon pri ĝia savado, al kiu kontraŭvole aliĝas ŝia amikino kaj eĉ la menciita doktoro.



**Ĝi estas demonstra versio de la 69-paĝa aprila *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# Ducent eminentuloj en unu volumo

Gorecka, Halina; Korĵenkov, Aleksander. *Nia diligenta kolegaro: Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj*. – Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 2018. – 320 p., il.; 500 ekz. – (Serio Scio, №10).

La renoma kaliningrada Esperanto-eldonejo *Sezonoj* kunlabore kun Litova Esperanto-Asocio el Kaunas kaj kun subvencioj de Esperantic Studies Foundation (ESF) kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) komence de 2018 eldonis ankoraŭ unu imponan verkon. Temas pri enciklopedio titolita *Nia Diligenta Kolegaro*, kiu en la subtitolo atentigas, ke temas pri “biografioj de 200 eminentaj esperantistoj”. Ĝi estas la deka volumo de la *Serio Scio*, aŭtorita de la tandemo Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov. Kvankam temas pri kompilaĵo de grandparte jam konataj scioj pri multaj aktivuloj de Esperantujo, la verko meritas la titolon “aŭtorita”, ĉar la biografioj estas pliampleksigitaj, kun plurlokaj plidetalingoj, kaj havas tute alian verkostilon, kio signifas, ke la novan, unuecan formon donis la du menciitaj aŭtoroj. La kompiladon helpis la dekpersona redakta komitato, en kiu troviĝis konataj nomoj de Esperantujo, kaj pli ol sepdek kunlaborantoj el diversaj landoj.

Antaŭ ol legi tiun 320-paĝan libron, oni konsideru, ke ĉiun similan verkon vole aŭ nevole karakterizas personaj gusto kaj elekto. Ĝuste pro tio la subtitolo, kiu anoncas pri “200 eminentaj esperantistoj”, pli adekvatas sen superlativo, kion la aŭtoroj certe bone pripensis. La eminenteco de unuopaj personoj ĉi tie prezentitaj, konsistas el ilia elstara rolo en la vasta Esperanto-movado, kaj estus malfacile diveni aŭ decidi, kiuj estas la plej eminentaj. En plej bona kazo de publika pritrakto de tiu temo okazus senfinaj disputoj, sen definitiva konsento, ĉar ĉies gustojn oni neniam kontentigus!

Por eviti kritikojn de malkontentuloj pri la enhavo, la aŭtoroj jam en la *Antaŭparolo* (p. 3-5) klarigis la kriteriojn, laŭ kiuj la verko estis kompilita. Kiel konate, la sola ekzistanta ĝenerala enciklopedio de Esperanto estas tiu, eldonita de *Literatura Mondo* en du volumoj en 1933, kaj dufoje senŝanĝe represita de Hungara Esperanto-Asocio (en 1979 kaj 1986). Tiu enciklopedio jardekojn poste estas tre neaktuala el multaj vidpunktoj. Antaŭ duonjarcento estis iniciatita nova eldono ĉe Centro de Esploro kaj Dokumentado, sed la afero neniam realiĝis. Aperis poste kelkaj landaj aŭ internaciaj biografiaroj, sed ili ne atingis la nivelon de ĝenerala kaj kompleta enciklopedio pri Esperanto. Pri la kompleto ne arogas fanfaroni eĉ la aŭtoroj de *Nia Diligenta Kolegaro*, kiuj sian verkon prezentis kiel aron da biografioj, kolektitaj laŭ anticipe difinitaj kriterioj. Kompreneble, tiuj kriterioj, almenaŭ laŭ mia opinio, ludis kiel limiga faktoro por havi pli justan elekton.

En la jaro 2000 Ljubomir Trinfonĉovski, tiama redaktoro de *Literatura Foiro*, petis la legantojn de la revuoj, aliĝintaj al la Esperanta Civito, kompili liston de cent

# NIA DILIGENTA KOLEGARO

HALINA  
GORECKA  
ALEKSANDER  
KORĴENKOV



plej eminentaj esperantistoj de la 20a jarcento, kiun li publikigis du jarojn poste. Sendepende de lia listo (el kiu Gorecka kaj Korĵenkov prenis 80 nomojn), la aŭtoroj de *Nia Diligenta Kolegare* kolektadis biografiajn kaj historiajn materialojn, kiuj, kombinitaj kun la listo de Trifonĉovski, farigis vefto por teksado de ilia verko. Startiginte la projekton en 2007, la aŭtoroj aldonis al la listo de Trifonĉovski la nomojn de la plej gravaj Esperanto-agantoj en la sferoj de movad-organizo, informado, instruado, scienco, esperantologio, literaturo, muziko, teatro, eldonado, redaktado, radio, interreto, komerco, turismo k. a. Ili ankaŭ aldonis la prezidantojn kaj direktorojn de UEA kaj de la Lingvaj Institutioj (Lingva Komitato kaj Akademio de Esperanto), kaj konsideris la listojn de la laŭreatoj de la ĉefaj Esperanto-premioj kaj la

personojn, kiuj ricevis la titolon de la “Esperantisto de la Jaro”. La aŭtoroj rifuzis postajn proponojn de tiuj, kiuj aludis pri “reprezenta laŭlanda principo” aŭ “politika ĝusteco”. Ili asertas, ke “La ĉefa kriterio estis kaj restis nur la graveco de la kontribuo de ĉiu konkreta persono, sendepende de ties nacia kaj seksa apartenoj” (p. 4), kiu estas aplikata nur al la elektitaj personoj, sed ne al same (aŭ eĉ pli) eminentaj, kiuj restis nemenciitaj, kaj tio nur konfirmas mian tezon pri nekongrua elekto.

El la 200 nomoj menciitaj en ĉi tiu libro, tri kvaronoj rilatas la forpasintojn, kaj nur 54 personoj estas vivantaj esperantistoj de nia epoko. Verŝajne multaj legantoj sendiskute akceptos la eminentecon de la forpasintoj, sed ĉe la vivantoj restos skeptikuloj kiuj opinios, ke la listo devis aspekti alie. Sed la kritikantoj devus relegi kion mi skribis ĉi-supre: la kriterioj por elekto ludis la ĉefan rolon, kaj ili estis anticipe konataj. Ŝajnas, ke ankaŭ la kreintoj de la kriterioj komprenis, ke temis pri la plej malforta ĉenero en ilia laboro. Do, ili anoncis novan eldonon (iam aperontan), en kiu estos pliaj 50 nomoj. Tiu sistemo estas pravigebla ĉar, se oni volus iam havi kompletan enciklopedion, oni devus kompiladi la materialon iom post iom dum jaroj, pliampleksigante kaj plidetaligante ĝin kaj enplektante en la laboron ĉiam pli da fakuloj kaj kunlaborantoj, kiuj kritike analizus la antaŭe ekzistintajn biografiojn. Se diri reale, la ĵus aperinta biografiaro akceptis ĝuste tiun principon! Por la elektitaj personoj (eĉ se la elekto ne ricevos plenan konsenton de la esperantistaro), la plenumitan taskon la duopo Gorecka-Korĵenkov faris konsiderinde pli kvalite ol estas ĝeneralaj kutimoj en Esperantujo. Ili uzis ĉiujn atingeblajn fontojn kaj jam konatajn biografiarojn, kompletigante la biografiojn per novaj ekscioj. Regule al ĉiu biografio ili almetis liston de konsultitaj verkoj aŭ artikoloj, kio estas kutima scienca maniero por dokumenti la rezultojn de sia laboro.

La verko estas organizita skeme, kaj ĉiuj biografioj havas difinitajn formon kaj enhavon. Temas pri bona enciklopedia stilo, en kiu Andreas Künzli en sia januara retmesaĝo malkaŝas “oficialecan stilon laŭ soveta kaj rusa enciklopedia tradicio, en kiu ĉiuj tiklaj temoj estas evitataj”. Laŭ mia persona opinio, la stilo tute kongruas kun ĝeneralaj enciklopediaj principoj: bona verkostilo, senerara teksto en faktografia senco, kvalitaj fotoj, prononco de nomoj, skribitaj ankaŭ en la originalaj alfabetoj, ktp. La longeco de biografioj estas unuecigita kiom eblas, kaj reale temas pri tre detalaj biografioj, kiuj donas sufiĉe klaran bildon pri koncernaj personoj. Eble menciado de t. n. „tiklaj temoj” elvokus plian intereson pri la verko, sed mi preferas tiajn analizojn legi en gazetaraj artikoloj, ĉar ofte temas nur pri nekontroleblaj kaj nesufiĉe bone dokumentitaj faktoj, kion mi asertas surbaze de miaj propraj esploroj. Foresto de iu informo ne malpliigas la valoron de la enestantaj faktoj!

Kvankam la geografia strukturo de iama mondo ne koincidas kun la nuna stato, laŭ provizora kalkulo mi nombris entute 41 landojn, kiuj konsistigas jenan liston (enkrampe troviĝas nombro da personoj): Francio (27), Germanio (21), Hungario (15), Pollando (11), Ruslando (11), Svislando (10), Britio (9), Italio (8), Kroatio (7), Nederlando (6), Bulgario (5), Ĉeĥio (5), Ĉinio (5), Hispanio (5), Svedio (5), Rumanio (4), Aŭstralio (3), Brazilo (3), Finnlando (3), Japanio (3), Litovio (3), Serbio (3), Slovakio (3), Usono (3), Barato (2), Belgio (2), Estonio (2), Koreujo (2), Vjetnamio (2), Armenio (1), Aŭstrio (1), Danio (1), Grekio (1), Islando (1), Israelo (1), Kanado (1), Latvio (1), Malto (1), Norvegio (1), Nov-Zelando (1) kaj Togolando (1). Konvinke la unuan pozicion tenas Francio, kaj en la supra parto de la listo ne surprizas la t. n. “grandaj Esperantaj nacioj” kiel germanoj, hungaroj, poloj, rusoj, svisoj, britoj, italoj.

Mirinde, mia lando Kroatio, okupas la tre altan 9-an loko kun 7 reprezentantoj! Sendiskute temas pri gravaj movadaj figuroj (Barković, Brozović, Flego, Gjivoje, Lapenna, Štimec, Tišljar), el kiuj du estis membroj de la redakta komitato (Štimec kaj Tišljar). Kvankam la elekto estas principe akceptebla, almenaŭ mi, kiel multjara esploranto de la enlanda movado, devus komenti foreston de pluraj nomoj en ĉiu branĉo al kiu apartenas la menciitaj kroatoj. En la teatra fako, krom Flego, certe mankas Vida Jerman kaj Mladen Šerment, en la literatura almenaŭ Lucija Borčić. Kio pri la akademiano kaj stilisto Ivo Rotkvić? Mi povus fari longan liston de merituloj kaj eminentuloj, sed kompreneble ili ne povus enesti pro la limigita nombro de 200 personoj kaj jam anticipe akceptitaj kriterioj por kompilado. Tamen ilia foresto el la listo ĵetas ombron sur la verkon mem, kun la espero ke en iam aperontan novan eldonon ili estos aldonitaj. Verŝajne same povus komenti ĉiu esperantisto el la 41 reprezentitaj landoj. Sed ni estu paciencaj, kaj permesu, ke la aŭtoroj de *Nia Diligenta Kolegare* plivastigu la rondon de niaj eminentuloj.

Analizi ĉiun unuopan biografion ne estis mia celo, sed mi supraĵe analizis nur la biografiojn de kroatoj. La biografio de Brozović nepre devus esti pli ampleksa. En la bibliografio de Ivo Lapenna mankas lia lasta libro *Elektitaj tekstoj pri Internacia*

*Juro* (2017), evidente pro antaŭvidita redaktfino de lia biografio. Sed ĝenerale la prezentitaj materialoj estas sufiĉe precizaj kaj ampleksaj.

Mi devas esti reala kaj diri, ke antaŭ ni tamen troviĝas valora libro, kiu meritas nian atenton. Se ekzistas homoj, kiuj povus kompili kaj eldoni ion pli ampleksan kaj pli valoran, mi estos tuj preta gratuli al ili, ĉar kritiki arogu nur tiuj, kiuj pli kapablas en konkreta fako, kaj ne nur kapablas, sed ankaŭ efektive faras! Tamen, ni konsideru, ke enciklopedioj neniam estas finitaj verkoj. Gorecka kaj Korĵenkov klopodis fari sian plej eblon en la kadroj de nia (kaj ilia) reala situacio. Komprenoble, pli facilas kritiki, ol fari la samon! Kaj la kritiko ofte estas same individua kaj persona sento, kiel la kompilado de verkoj similaj al *Nia Diligenta Kolegare*! Pli konvenus kolektive kompiladi materialojn por ampleksega enciklopedio, kiu ne limiĝus je nur 200 nomoj. Eĉ se ni sukcesus iam kompili tian verkon, ĉiam iu nomo forestus pro la evidenta malzorgo de esperantistoj pri siaj antaŭuloj. Mi mem spertis neblon trovi eĉ minimumajn informojn pri pluraj gravuloj de nia movado, ĉar ene de Esperantujo ne funkcias sistema kolektado de informoj, kaj parencoj kaj posteuloj ofte ne ekzistas aŭ estas indiferentaj al niaj klopodoj. Ofte eĉ la aktualaj leĝoj pri protekto de personaj informoj malebligas akiron de necesaj faktoj kaj ilian publikan uzon. Do, en tia lumo *Nia Diligenta Kolegare* tamen sukcesis plenumi sian mision, aŭ, pli bone dirite, transiri la unuan ŝtupon, ĉar kun granda intereso ni sekvos ĝian daŭrigon!

**Josip Pleadin**

## **Heroldo survoje al akuratiĝo?**

Dum sia unua Brazila eldonjaro *Heroldo de Esperanto* frontis multajn problemojn internajn (forpaso de la kuneldonanto) kaj eksterajn (konflikto kun la antaŭa eldonanto). Ni petis la administran direktoron de *Heroldo* Fabrício Valle rakonti pri la stato de la legenda gazeto, kiu centjariĝos post du jaroj.

Aperis ses numeroj por 2017. Tri el ili jam aperis ankaŭ papere. La aliaj tri aperos. La modernan retan version mi mem konstruas.



Ĝi estas demonstra versio de la 69-paĝa aprila *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

# *Mozaiko*



La 1an kaj la 8an de aprilo la malsamkalendaraj kristanoj festas la Resurekton de Kristo. Ni gratulas ĉiujn niajn kristanajn legantojn kaj deziras al ili Gajan Paskon!

# La februara krucvortenigmo

Venis kvin respondoj, ĉiuj ĝustaj. Ilin sendis Malcolm Jones (Britio), Bruno Lehtinen (Finnlando), Edeltraut Henning (Germanio), Hanna Skalska, Zbigniew Tylkowski (Pollando).

La ĝustaj respondoj: 1. etan'; 2. rato; 3. tref'; 4. kafo; 5. piko; 6. faro; 7. Uran'; 8. antr'; 9. rapo; 10. apio; 11. homo; 12. emuo; 13. boao; 14. oero; 15. reao; 16. sodo; 17. arde'; 18. kabo; 19. Romo; 20. ador'; 21. poto; 22. rent'; 23. geko; 24. moto; 25. modo.

La loto donis libropremion al **Hanna Skalska**, kiun ni gratulas. Dankon al ĉiuj partoprenintoj.

## Ho, tiuj advokatoj...

### Kiel pagi ŝuldon?

Viro venas por konsilo al advokato.

– Mia najbaro ŝuldas al mi 100 spesmilojn, sed li ne redonas. Ĉu mi povas iamaniere ricevi mian monon?

– Vi povas, sed por tio necesas skriba pruvo de tio, ke li ŝuldas al vi. Ĉu vi havas tian pruvon?

– Mi timas, ke ne. Li prenis mian monon sen io ajn.

– Tiukaze skribu al li leteron kaj postulu en ĝi, ke li senprokraste redonu al vi 200 spesmilojn.

– Sed li ŝuldas al mi nur 100.

– Ĝuste tion li respondos. Kaj tio estos skriba pruvo.

### Tri demandoj

– Kiom vi prenas por konstultado? – kliento demandis la advokaton.

– Mil dolarojn por tri demandoj.

– Ĉu tiom multe?

– Jes. Kia estos via tria demando?

### Infero por advokatoj

La verdikton de la Lasta Juĝo oni povas apelacii en la Lasta Apelacia Juĝo.

La verdikton de la Lasta Apelacia Juĝo oni povas apelacii en la Plej Lasta Apelacia Juĝo.

La verdikton de la Plej Lasta Apelacia Juĝo oni povas apelacii en la Pleja Plej Lasta Apelacia Juĝo. <...>

nenio eksterordinara – tio estas la infero por advokatoj.

Plukis kaj tradukis **Kukucapa Nemoskovskaja**

# Spritaj splitoj kaj preskeraroj

## *El la kolekto de reduktoro*

### *Hardado daŭre necesa*

EKO 2018-06 Intruista trejnado (Amasmesaĝo de Stefan MacGill, 25 mar 2018)

### *Post ratmasaĝoj, venas ratikoloj*

Kovrilpaĝe vidiĝas velboato, kun kiu bravaj partoprenantoj atingis la italan kongreson 2017... La ratikolo de Alessandro Mazetti (la ŝipestro) bonege detalias la vojaĝon... (*La KancerKliniko*, 2018, №165, p. 13; rimarkis Ionel Oneț)

### *Sendu akuzativon!*

Helpu esperantisto el Afriko (<https://www.vakinha.com.br/vaquinha/helpu-al-esperantisto-el-afriko>; stato 27 feb 2018)

### *Akuzativo sendita, sed hungara*

Baghy, Julio: *Sur sanga terot.* (<https://www.getit01.com/p2018020133175007>)

### *Ĉu bugra fiaro?*

Kiel ni jam informis en la januara numero, aperis vere escepte grava dokumento por la Emovado, la bografiaro de 200 plej elstaraj esperantistoj en la ĝisnuna 130-jara historio. (Zlatko Tišljár. *Nia diligenta kolegaro // Eŭropa Bulteno*, 2018, №2, p. 8)

### *Hibrida azenaĵo*

Ankaŭ la junularo kaj la meza generacio [...] regule funkcias kaj kontaktas [...] per interreto [...], kio de temp' al tempo kondukas ankaŭ al fizikaj renkontiĝoj. Kiel ankaŭ la mullingvistoj. Tio bonas kaj funkcias. (Peter Kühnel, grupo esperanto-berlin, 8 mar 2018; trovis Lu Wunsch)

### *Subtenu nur mejloŝtonojn*

2018, proklamita la Jaro de la Esperanto-kulturo iĝu por ĉiuj ni bona tempo por krei, disvolvi kaj zorgeme konservi, subteni ĉion tion, kio konsistigas la kulturon de Esperanto kaj estas mejloŝtono de nia vivanta lingvo. (Dima Ŝevĉenko, Anna Striganova. *Malferme // Esperanto*, 2018, №3, p. 51.)

### *Jardekoj da ventoblovo*

Temas pri eble la plej grava socia fenomeno de la nuntempo kaj tre verŝajne ankaŭ de la ventontaj jaroj kaj jardekoj. (Javier Alcalde *respondas la demandojn // Esperanto*, 2018, №4, p. 76)

### *Reta incendio*

Matthias, Ulrich. *Fajron sentas mi internet.* (<https://www.getit01.com/p2018020133175007/>)

Plukis **István Ertl**

Se en via lando estas peranto de *La Ondo de Esperanto*, pagu al tiu en via landa valuto. Ni havas perantojn en pluraj landoj. Vidu la liston de la perantoj ĉi-sube.

Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon por 15 eŭroj al la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo), kopie al nia redakcia adreso rete (sezonoj@kanet.ru) aŭ poŝte (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando – Россия). Nia UEA-konto “avko-u”.

Vi povas uzi la internacian monpagan sistemon PayPal, vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ruslandanoj pagu 750 rublojn al Галина Романовна Горецкая poŝte (RU-236039, Калининград, аб. ящик 1205), banke (petu informojn pri la kontonumero). Ni akceptas pagojn ankaŭ per Яндекс.Деньги (konto 4100138523456, informu retpoŝte pri la pagonumero), vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

## Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

**Argentino:** Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla — 52, CP 5507 — Vistalba, Luján de Cuyo Mendoza. Rete: [rosar@fibertel.com.ar](mailto:rosar@fibertel.com.ar).

**Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016. Rete: [libroservo@ans.com.au](mailto:libroservo@ans.com.au).

**Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg. Rete: [aon.913548977@aon.at](mailto:aon.913548977@aon.at).

**Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be).

**Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-902 Brasília-DF. Rete: [bel@esperanto.org.br](mailto:bel@esperanto.org.br).

**Britio:** EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: [eab@esperanto.org.uk](mailto:eab@esperanto.org.uk)

**Bulgario:** Georgi Mihalkov, «Nadeŝda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: [modest@abv.bg](mailto:modest@abv.bg).

**Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: [Cea.polnicky@quick.cz](mailto:Cea.polnicky@quick.cz).

**Ĉinio:** Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jinqiao Touzi Gongsi, Jingchuan-Xian Nonglin-lu, Pingliang Gansu, CN-744300. Rete: [agrikulturo@126.com](mailto:agrikulturo@126.com).

**Danlando:** Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø. Rete: [arne-casper@email.dk](mailto:arne-casper@email.dk).

**Estonio:** Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: [ahto.siimson@esperanto.ee](mailto:ahto.siimson@esperanto.ee).

**Finnlando:** EAF / Paula Niinikorpi, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: [paula.niinikorpi@gmail.com](mailto:paula.niinikorpi@gmail.com).

**Francio:** Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: [info@esperanto-france.org](mailto:info@esperanto-france.org).

**Germanio:** Wolfgang Schwanzner, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: [libroj@esperanto-buecher.de](mailto:libroj@esperanto-buecher.de).

**Hispanio:** Pedro A. Garrote, C/Las Mercedes, 5-5°-C ES-47006 Valladolid. Rete: hiperanto.uea@terra.com.

**Hungario:** Esperanto-Centro Eventoj, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapeŝt. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

**Hungario:** Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapeŝt, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

**Irlando:** Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Rete: noviresp@eircom.net.

**Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, p. k. 1081, IS-121 Reykjavík. Rete: esperant@ismennt.is.

**Italio:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: f-esp-it@libero.it.

**Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

**Katalunio:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008 E-08204 Sabadell, Katalunio. Rete: v.sole@esperanto.cat.

**Koreio:** KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703. Rete: kea@esperanto.or.kr.

**Kroatio:** Marija Beloŝević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: mbelosev@public.carnet.hr.

**Latvio:** Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga. Rete: margarita.zelve@gmail.com.

**Litovio:** Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

**Meksiko:** Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos Av. 523, No.187, 1a Sección de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero, México D.F., CP 07969, México. Rete: ondo@esperanto-mexico.org.

**Nederlando:** Univerala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Rete: ionel@co.uea.org.

**Norvegio:** Anne Karin Bondhus, Morenefaret 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: akbondhus@jkn.no.

**Nov-Zelando:** G. David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland NZ-0753. Rete: gddewar@ihug.co.nz.

**Pollando:** Pola Esperanto-Asocio, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa. Rete: sekretario@esperanto.pl.

**Ruslando:** Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, аб. ящик 1205. Rete: sezonoj@kanet.ru.

**Serbio:** Miomirka Kovačević, Španskih boraca 32, RS-11070 Novi Beograd. Rete: miomirka.kovacevic@gmail.com.

**Slovakio:** Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: revuo@stonline.sk.

**Svedio:** Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: leif.holmlund@telia.com.

**Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen. Rete: ch\_scheidegger@bluewin.ch.

**Usono:** Esperanto-USA, P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530. Rete: elna@esperanto-usa.org.

*Neniam sendu monon en kovertoj!*

**30-a Internacia  
Esperanto-Konferenco**



**Temo:**

# **ESPERANTO EN ARTOJ**

**21-a ĝis 27-a julio 2018  
en kastelo Grésillon (Francio)**



**Riĉaj prelega, kultura  
kaj turisma programoj**

**Pliaj informoj kaj aliĝiloj ĉe:  
[osiek.org/iek](http://osiek.org/iek)**



## LIPTOVSKÝ MIKULÁŠ (SK) 14 - 22 JULIO 2018

Venu sperti la plej mojosan someran Esperanto-lernejon!

Somera Esperanto-Studado (SES) estas semajna somera internacia lernejo de Esperanto por kaj komencantoj kaj progresintoj kun riĉa distra programo.

► Por informoj kaj aliĝo vizitu: <http://ses.ikso.net>



# 103-a Universala Kongreso de Esperanto

Lisbono, 28 julio - 4 aŭgusto 2018

